

INFORMA BULTENO

Ligilo inter la esperantistoj de la Mehlena Regiono.

APERAS MONATE

KUNVENEJO :

ADRESO : H. Rainson, Hombeekschēn Steenweg, 54, Mechelen.

938
1.10.1935

I Januaro 1935.

La monata kunveno okazos la 4an de Januaro 1935 en la etaĝa salono de la popolbiblioteko.

Tagordo.- Raporto, komunikaĵoj.- Pago de la kongreskotizoj - Pri la agado dum 1935. - Pri la nova organizo de la grupkunvenoj.

1935 komenciĝis

Kuraĝon por daŭrige labori por Esperanto, tion alportu la nova jaro al vi, karaj geanoj. Tiu kuraĝo kaj tiu laboro vin alportu la feliĉon. 1935 devas esti novan paŝon antaŭen por nia movado. Tial ni devas labori, obstine labori.

Unue ni devas prilabori nin mem; celi al pli perfektigo en ĉiuj direktoj: kono de la lingvo, de la movado, de la historio, de la bazoj kaj principoj; tio nin helpas pli intense kaj pli racie propagandi; des pli ni estas kapablaj Esperantistoj, des pli ni sukcesos diskonigi niajn ideojn pri nia mondlingvo.

Por la sinperfektigado ni nepre bezonas uzi ĉiujn rimedojn, kiujn la movado metas je nia dispono: multe kaj atente legi kaj analizi revuojn kaj librojn en aŭ pri Esperanto; regule ĉeesti la kunvenojn, kaj paroli, ĉie kaj ĉiam, en ĉiuj eblaj cirkonstancoj, nian ŝatatan lingvon.

Due ni ankaŭ senĉese devas pri labori nian ĉirkaŭaĵon. Al ĉiuj ni devas paroli pri Esperanto. Certe, ne ĉiuj al kiuj ni parolos pri nia movado tuj fariĝos fervorajn verdstelanojn, sed ne gravas, propagandu nur daŭrige, tiel vi semos kaj certe iam ni rikoltos. Do, kuraĝe antaŭen, Esperanto venkos la mondon.

H. Rainson.

La lingvo de la Estonteco.

En malnova

la ~~lingvo~~ Esperanto gazeto "La Verda Stelo" de 1927 ni trovis tajn signifplenajn vortojn, kiuj klare montras ke Esperanto, la netuŝebla Esperanto, povas servi la homaron ĝis la fino de la jarcentoj.

Ni citas:

"Krom la avantaĝo permesi al ĉiuj personoj de meza instruiteco ĉiulandaj interkompreniĝi, la strukturo kaj universala aplikado de Esperanto prezentas la econ de nevariemo; ĉar la jarcentoj ĝin riĉigis per la novaj vortoj postulataj de la progresoj sociaj, sed modifas nek ĝian konstruon nek ortografion: prefero treege estiminda, ĉar kontraŭe al tio, kio okazis al hispano aŭ anglo aŭ franco el la XXa j.o.; kiuj ne komprenas la verkojn en siaj lingvoj skribitajn ses aŭ sep jarcentojn antaŭe, la homoj centjarcentaj ne trovis malfacilaĵojn konsultante antikvajn librojn aŭ dokumentojn, tial ke ne ekzistis Esperanto antikva kaj Esperanto moderna, sed nur unu sola kaj unika Esperanto: la primitiva, riĉigita sed ne modifita."

Tiel estos se ni pioniroj restos fidelaj kaj kuraĝe laboros.

P.V.

Bonvolu aldoni al la librolisto:III 35 Norda literaturo - tradukitaj noveloj el la latvia literaturo.

Pro Eug. Lambert

~~Commissaire des Indes~~

~~G. H.~~